 awanturyŝn (min.) (heljo- lit) aventurino, helio- lito

loj de la mondo — Dio scias, jam kioman fojon — fervore rakontas unu al la alia pri la Esperanto-Betlehemo, pri la negranda ĝis nun preskaŭ nekonata en la vasta mondo pola urbo Białystok, en kiu la tagan lumon ekvidis tiu granda Homarano kaj Instruinto. Oni rakontas pri la ligna, preskaŭ jam ruiniĝinta dometo, en kiu Li naskiĝis, kaj revemuloj ekŝpinas belajn legendojn pri la viro, kiu venis en la mondon por detruigi la Babelan turon.

Tiamaniere do la nomo de tiu urbo engravuriĝas en la cerbon de miloj, kiel io specifa, kiel io simbola, vekanta estimon misteran kaj senton neklarigeblan.

Grandaj homoj iras ofte en la vastan mondon por prediki siajn pensojn kaj ideojn, kaj forgesas en la florado de ilia gloro la lokon, en kiu ili kreskis. Tiam okazas, ke tiuj perfiditaj hejmlukoj plej forte obstinas kontraŭ siaj propraj filoj, rifuzante iliajn instruojn kaj refuzante iliajn teoriojn, kaj la tero, el kiu elĝermis la unuaj freŝaj semoj, poste fertiliĝas kaj sekiĝas.

Sed Białystok restis fidela al sia Profeto same, kiel fidela al sia urbo restis la Profeto en la plej gloraj tagoj de sia vivo. Liaj samurbanoj bone komprenis Lin. Liaj samurbanoj sekvis Lin, la unuan inter la Majstroj, kiun la propra urbo rekonis.

Kiam okazis la unua universala pilgrimo de discipuloj de la varsovia tombo al la Białystoka lulilo de la Majstro, kortuŝaj, ofte koraŝiraj estis momentoj inter la simplaj loĝantoj de tiu feliĉa urbo. „Nian grandan Zamenhof oni venas honori!“ — flustris maljunulo, memoranta ankoraŭ nian Majstron, kiel knabeton reveman, kaj larmoj montriĝis en liaj multon jam vidintaj okuloj. Tiu maljunula jubilo estis plivere adoro, kvankam tiu maljunulo malplej bone orientiĝis en la esenco de la noblaj altaj instruoj de nia Majstro.

Nun venis aliaj samurbanoj, kiuj krom ĝoji kaj adori volas ankaŭ labori sinofereme por la efektiviĝo de la idealoj de la Majstro. Kaj ni ĝojas konstati, ke ili sukcesas ĉiurilate. Tie la poresperanta agado havas kvazaŭ sanktan mision kaj estas karakterizita per iu nobla egoismo: tamen ni, Bjalostokanoj, ne malkonfesas nian Profeton; ni laboras por la venko de Lia verko kaj por la eterniĝo de Lia granda nomo!

Kaj ni, ceteraj Zamenhofanoj, povas nur envie deziri al ili pluajn multajn senĉesajn sukcesojn.

I. Lejzerowicz.

## LINGVA FAKO.

(El „Supera Kurso“ de Dro Dreher).

### La infinitivo -i.

La prepozicioj **anstataŭ**, **antaŭ**, **por** kaj **sen** postulas la infinitivon -i. Sed inter la prepozicion antaŭ kaj la infinitivon -i oni metas la komparvorteton „ol“. ĉar „antaŭ ol“ = „pli frue ol“:

Anstataŭ publikigi ion = anstataŭ publikigo de io; por scii ion = por scio de (pri) io; sen montri ion = sen montri de (al) io; antaŭ ol presigi ion = antaŭ presigo de io.

La infinitivon postulas multaj verboj, alie ol en la naciaj lingvoj (orienteŭropaj):

Mi deziras vivi = mi deziras vivon; oni permesas skribi = oni permesas skrib(ad)on; Dro Z. ekzercis uzi Esperanton = Dro Z. ekzercis la uzadon de E. (aŭ: ekzercis sin en la uzado de E.); mi vidis lin kuri = mi vidis lian kur(ad)on, aŭ: mi vidis lin kuranta (Lec. IX.).

La infinitivon postulas ankaŭ elverabaj substantivoj:

Deziro vivi = deziro de (al) vivo; kapablo esprimi sentojn = kapablo de esprimado de sentoj; arto (= artista povo) krei belon = arto de kreado de belo.

Oni diras: estas neeble citi ĉion = cit(ad)o de ĉio estas neebla; ludi estas agrable = lud(ad)o estas agrable.

Kiel malpermesi = kiel estas eble malpermesi. — Por tiel diri = [(por) ke] ni diru tiel.

Oni diras: kio estas necesa (ne: necese), sed: kion estas necese fari?

It is, c' est, es ist, to jest ne estas tradukata en E., oni diras: estas (malpermesite), estas (bone) ktp, Oni uzas ankaŭ ĝi aŭ tio, ekz. tio estas vi, Ivan, aŭ: ĝi estas vi, Ivan. La nepersonan it (rains), il (pleut), es (regnet) oni ne tradukas (pluvas, hajlas, tondras, sen „ĝi“).

Oni ———as = estas ———ate: oni diras = estas dirate, simile: estas konate, estas permesite ktp.

## *Insigno de l'Kristo.*

(El „Poeziaĵoj“ de L. Kronenberg).

Nokt'!  
 Nokto malhela,  
 Dum kiu plej bela,  
 Elkora fariĝas pensar'!  
 Tra tuta ĝis fluas landar',  
 Al ĉiuj nacioj,  
 Ĉiuj religioj  
 Ĝi fluas tra mar',  
 Tra la naci'ar'  
 Al tuta, tutega homar'!  
 Al ĉiu ĝi iras hom',  
 Ĉiun vizitas domon!  
 Ĉiun, ĉiun amprenas,  
 Ĉiun, ĉiun komprenas,  
 Kaj ĉiun, ĉiun domon  
 En sankta nom'  
 De l' Kristo ĝi benas!

— — — — —  
 Flamas, flamas la kor'!  
 Ĝi flamas, ĉar amas,  
 Ĉar fajras per am',  
 Ĝi fajras, ĉar amas,  
 Kaj volas ke l' Am'  
 Regu je l' mond'  
 En rond'!!  
 — — — — —

Flamas, flamas la kor'!  
 En mondon ĝi iras,  
 Al amo ĝi tiras,  
 Amplene ĝi spiras  
 Kaj vokas al ĉiu naci'!  
 Finiĝu la lac',  
 Batala la lac',  
 Kaj venu, venu jam pac'!

— — — — —  
 Venu la pac'!  
 Nacioj de l' mond'  
 Stariĝu en rond',  
 Kaj gaje, el kor'  
 Komencu kanton en hor'!  
 Komencu en hor'  
 Kanton de la kor',  
 De l' tuta kanto ter',  
 La kant', ke fine  
 En man' de l' hom',  
 En ĉiu dom'  
 Ne estu plu fer'!  
 Ke el tuta ter'  
 Batala foriru fer'  
 Kaj amo ke estu,  
 Konkordo ke festu  
 Venke inter nacioj de l' ter'!

## POLLANDA KRONIKO.

**BYDGOSZCZ.** Post priesperanta parolado de la loka delegito S-o Prengel, komenciĝis Esperanto-Kurso ĉe l' „Deutsches Privatgymnasium“, kiun ĝis nun partoprenas 20 ĝelernantoj. La kurson gvidas la gimnaziano Reinhold. Estas intencite fondi grupon.

**JAROSŁAW.** Asocio de instruistoj de popollernejoj organizis ĉi tie kvarmonatan kurson de Esp. Aliĝis 16 personoj. Gvidanto estas s-o Antoni Wachułka. Prepariĝas senpaga kurso de Esp. por instruistaro. La afero akiris favoran subtenon de s-o lernejinspektoro Mieczysław Bem.

**KATOWICE.** En „Ognisko“ ekzistanta ĉe la urba komercista lernejo komenciĝis kurso kun 25 partoprenantoj, kiun gvidas prof. W. Chrzanowski.

**KRAKÓW.** Finintinoj de la Esperanto-kurso por skoltinoj fondis propran grupon, kiu nomiĝis „Harcerskie Kółko Esperanckie“ (Skoltina Esperanto-Rondo). La estraron prezidatan de f-ino M. Kazanowiczówna (adreso: Kraków, Lubomirskiego 43), eniris f-inoj: Z. Richterówna, K. Burzyńska, Z. Michniewska, S. Melechówna, C. Dańkówna, M. Królówna. La revizian komisionon apartenas f-inoj: M. Terpliwówna, W. Skrzypkówna, E. Kędzierska. Fine de l' februaro estos organizita semajno de propagando kun tre interesa programo. La preparaj laboroj jam komenciĝis. — La loka Esperanto-Societo aranĝas la 14-an de dec. Zamenhofan festvesperon.

**LUBLIN.** Samideano Czesław Pruski sciigas al ni, ke 260 novaj gekursanoj estas instruataj laŭ la senpera metodo de s-roj Olszowski kaj Cz. Pruski. La 21/XI komenciĝis 3 monata plena kurso, kiun gvidas du menciitaj samideanoj. Ejon por la kurso oferis senpage la Magistrato de Lublin. Ni bondeziras grandan sukceson!

**LWÓW.** Ĉi tiea societo aranĝas de tempo al tempo komunan legadon. S-ino koloneledzino Wojakowska gvidas fervore kurson, kiun partoprenas 30 kursanoj.

**STASZÓW.** La 16-an de nov. okazis publika prelego de s-o M. Rizenberg en la ejo de laborista societo; post la prelego organiziĝis la kurso kun 23 partoprenantoj.

**WARSZAWA.** Dimanĉe la 15-an de dec. je la 16 horo (eventuale 16 h. 20 m.) parolos okaze de la esperantista festo per la Varsovia radjostacio s-o Edvardo Wiesenfeld. Ĉiuj samideanoj (eĉ neaŭdintoj) konsideru sia nepra devo sendi dankesprimojn laŭ adreso: Polskie Radio — Warszawa. Tio estas nepre bezona por la bono de nia afero en Polujo. — Eldonata ĉi-tie revuo dusemajna s. t. „Poczta“, organo de poŝtista ligo, posedanta ĉirkaŭ 20.000 membrojn, komencis aperigadi korespondan kurson. Eminentaj sukcesoj akirita dank' al penadoj de s-o Zawada, sekretario de societo „Laboro“ kaj aŭtoro de nove elveninta fundamenta vortaro esp.-pola. — La 8. XI. okazis kunsido de la organiza komitato de „Esp-a Pedagogia Kurso“, celanta prepari kvalifikitajn instruistojn de Esp. por enlandaj lernejoj. — Faka semajna gazeto „Radjo“ aperigadas regule esp.-angulon, en kiu troviĝas esp.-disaŭdigoj de eŭropaj sendstacioj. La angulo estas gvidata de s-o Wiesenfeld.

**WILNO.** Akademia Esperanto Rondo ĉe Universitato de Stefan Batory aranĝis la 16-an de nov. propagandan vesperon. Pri la neceso de la lingvo Esperanto parolis s-o univ. Prof. Muszyński, je temo: „Esp. kaj arto“ s-o prof. de konservatorio Józefowicz, s-o Sakowicz raportis pri la Budapesta kongreso. Kantis tre bele esp. kantojn f-ino Jabłońska, okazis ankaŭ esp. deklamado. La ĉeestantoj vigle rigardis propagandan ekspozicion. Estas menciinde, ke oni ne forĝesis pri varbado por UEA.

### † Dro. STEFAN MIKOŁAJSKI.

La 27. de novembro 1929 mortis en Lwów dro Stefan Mikołajski en la 68. vivjaro. Li naskiĝis en Kraków. Fininte gimnaziajn studojn li frekventis medicinan fakultaton de la Jagielona Universitato en Kraków. Komence li praktikadis en la urbeto Brzesko en okcidenta Malgrandpolujo. Sed la provinca urbo estis malvasta por lia granda spirito kaj en la j. 1901. li translokiĝis en la ĉefurbon Lwów, kie li tuj fariĝis fama agemulo. Politike li ludis gravan rolon en la popola partio kaj estis kunredaktoro de tagjurnalo Kurjer Lwowski. Estante elokventa oratoro kaj sperta stilisto li baldaŭ eniris la urban senaton kaj laboris en ĝi tre efike dum pli ol 20 jaroj por la ordo kaj higieno de la urbo.

En Lwów li ankaŭ baldaŭ komencis la eldonadon de socialmedicina duonmonata gazeto Głos Lekarzy, en kiu li ĝis la mondmilito solvis multajn socialme-

dicinajn problemojn kaj kiun legadis ĉiuj kuracistoj de Malgrandpolujo. Ellerninte en la j. 1908 la mondlingvon, li baldaŭ komencis sola la eldonon de la unua esperanta medicina ĵurnalo s. t. „Voĉo de kuracistoj“, eldonante ĝin dum la jaroj 1909—1911, kaj atingis tiam preskaŭ mil abonantojn sur la tuta terglobo. Sprite li ekinterestigis la tutmondan kuracistaron per aranĝo de enketoj pri mortpuno, pri la kuracista sekreto k. t. p. Bedaŭrinde pro banko de monrimedoj li estis devigata ĉesi la pluan eldonadon. Dum la VIII jubilea mondkongreso 1912 en Krakovo li estis elektita prezidanto de la kongreso kaj gvidis ĝin digne, energie kaj vigle je ĉies kontento.

Dum kelkaj kadencoj li estis laborema estrarano de la orientgalicia Kuracista Ĉambro kaj agis multe por plibonigo de sociaj cirkonstancoj de polaj kuracistoj, ellaborinte ankaŭ precizan kodon de kuracista deontologio, validan ĝis hodiaŭa tago. Dum la militjaroj li tre suferis psike kaj korpe pro la malamika okupacio de la lando kaj malsano. Kiam reviviĝis la pola Ŝtato, la unua ministro por sanitaraj aferoj dro Chodźko konfidis lin per la sanitaraj aferoj de orienta Malgrandpolujo kaj M. funkciis kiel direktoro de la sanitara departemento de la vojevodejo ĝis la morto. Ŝatata pro sia kristala, puritana karaktero kaj miriganta pro sia fera agemo kaj laboremo li ne ĉesis ofici ĝis preskaŭ la lastaj tagoj de sia vivo. Malica malsano, kancero de la pankreaso, rompis tro frue ĉi tiun fortan, spiriton. Multege li skribis por ĝeneralaj kaj medicinaj ĵurnaloj, multege referatis ĉe kunvenoj, enketoj, kongresoj, verkis kelkajn popular-medicinajn librojn. Lia libreto pri tuberkulozo ricevis la unuan premion konkursan de la Higiena societo kaj disvastiĝas en multmilaj ekzempleroj inter la popolo, penetrante la vilaĝajn kabanojn. En multaj higienaj societoj kaj institucioj li vigle kunlaboradis. La enterigo okazis la 30. de novembro kaj estis granda, malĝoja manifestacio, kiun partoprenis multaj kuracistoj, altrangaj oficistoj kaj adorantoj, kaj la mortajn restaĵojn adiaŭis en altaj laŭdoj reprezentanto de la interna ministerio, la prezidantoj de la Kuracista societo, Kuracista Ĉambro, Higiena kaj Kontraŭtuberkuloza societoj. Foriris de ni por ĉiam granda viro, kies memoron ni kun admiro kaj adoro konservos.

Dr. Fels.

## KRONIKA ZAGRANICZNA.

**CZECHOSŁOWACJA:** Brno. W dniu 22. 9. br. odbyło się w Bernie poświęcenie pierwszego na Morawach sztandaru esperanckiego. Poświęcenia sztandaru dokonał biskup Dr. J. Kupka w obecności licznie przybyłych delegatów klubów i towarzystw esperanckich Czechosłowacji.

**ESTONJA:** Tallin. Dzięki energicznym zabiegom p. J. Grüntal, inspektora szkolnego w Tallinie miejscowe „Esperanto Asocio“ zaprosiło w ostatnich czasach p. Andreo Ĉe celem urządzenia kursów języka Esperanto. Po silnie przeprowadzonej w miejscowych gazetach, afiszami i osobistymi zaproszeniami agitacji urządził pan Ĉe odczyt o Esperancie. Liczba obecnych na odczycie wynosiła około 500 osób. Po odczycie urządzono kursy języka esperanto, a z powodu wielkiej ilości zgłoszeń musiano utworzyć równocześnie aż dwa kursy. Każdy z kursów liczył przeszło 100 słuchaczy. Słuchacze składali się z rozmaitych warstw społecznych; większość stanowiła młodzież szkolna, następnie urzędnicy, nauczyciele i sfery kupieckie. Zaznaczyć należy, że ruch esperancki w Estonji wzrósł w ostatnich czasach ogromnie. Kursy prowadzone na prowincji przez pp. E. Malgrena, K. Grigorjewa i E. Pähn dały nadspodziewane wyniki.

**LOTWA:** Ryga. Kursy języka esperanto, urządzone przez A. Ĉe dały bardzo dodatnie wyniki. Na lekcję próbną, urządzoną w dniu 13. X. br. przybyło 230 słuchaczy, sam zaś kurs ukończyło 130 osób. Kursy były urządzone staraniem „Riga Instruista Profesia Societo“ i „Latva Esperanto Societo“.

**NIEMCY:** Drezno. Łącznie z mającą się odbyć w czasie Zielonych Świąt w r. 1930 Międzynarodową Wystawą Hygjeniczną w Dreźnie odbędzie się w tymże mieście XIX. Niemiecki Kongres Esperancki. Komitet zamierza w czasie Kongresu urządzić na wielką skalę kursy esperanta, które prowadzić będzie p. Andreo Ĉe.

**SZWECJA:** „Svenska Esperanto-Tidningen“ donosi w ostatnich swych numerach o nadzwyczajnym rozwoju Esperanta w Szwecji. Rozwój Esperanta w Szwecji przypisać należy w pierwszym rzędzie sukcesom, jakie osiągnęły kursy p. Andreo Ĉe. Obecnie wielką popularnością cieszy się Hindus p. Lakshmiswar Sinha, który obrawszy sobie Gävle za bazę operacyjną, objeżdża całą Szwecję



i wygłasza odczyty w języku esperanckim. Każdy odczyt cieszy się frekwencją setek słuchaczy.

**WĘGRY: Békéscsaba.** W dniu 30. 9. br. rozpoczęto w tut. Tow. Esperanto metodą Andreo Ĉe kurs języka Esperanto. Już w pierwszych dniach trwania kursu zgłosiło się 70 słuchaczy. Na uroczystość zakończenia kursu zaproszono prof. J. Mihalika, przewodniczącego XXI. Kongresu, który wygłosił w dniach 2. i 3. XI. br. dwa przemówienia o Esperancie w obecności 84 i 100 osób. Po kursie i pod wpływem przemówień prof. Mihalika dyrekcja miejscowej wyższej szkoły handlowej nosi się z zamiarem wprowadzenia Esperanta do pierwszych klas tej szkoły.

**Tuszkiewicz Bronisław.**

## BIBLIOGRAFIO.

**George Fox.** Fondinto de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj). 1624—1690. Henry van Etten. Friends' Council for International Service 136 Bishopsgate, London, E. C. 2. 1924. Prezo 3d. — La broŝuro resume priparolas la personon de George Fox, kiu precipe en anglolingvaj landoj estas bone konata, kiel fondinto de kvakeroj. La lingvaĵo esperanta estas tre bona kaj la enhavo vere leginda por ĉiuj.

**Dr. L. Dreher.**

**Sivaĝi.** Originala teatraĵo de hinda esperantisto en Svedujo, kies nomo estas Lakshmiswar Sinha. Eldonita de Eldona Societo Esperanto en Stockholm. La prezo Kr. 1.50. Agrable mi legis tiun historian scenon de la 17 jarcento, kies Esperanto, kvankam iom sub angla influo, estas flua ĝuste pro sia angla koncizeco kaj simpleco.

**Dr. L. Dreher.**

**Podróż po świecie dostępna dla każdego** napisał Bol. Czechowski, Sosnowiec 1929. Cena nie podana. Broszurka propagandowa o 32 str. Na treść jej złożyły się krótkie artykuły, których autorami jest kilkunastu esperantystów z całego świata, mające dowieść potrzeby esperanta w międzynarodowych stosunkach. Jest to cenna broszurka, mogąca oddać wielkie usługi w propagowaniu naszego języka. Razem z dwiema książkami, omówionymi w ubiegłym miesiącu, jest dowodem, że ruch wydawniczy z zakresu literatury esperanckiej zaczyna się u nas w ostatnich czasach ożywiać dzięki inicjatywie prywatnej poszczególnych jednostek. Cześć im za to!

**Theta.**

Lasttempe aperis „**Klasigita Terminaro de Esperanto**“ kompilita de Eĉeno S. Cian kaj eldonita de Ŝanhaja Esperanto Asocio. Libreto 32 paĝa, kiu estas malgranda vortaro esp.-hina, enhavas en 27 ĉapitroj la plej ofte uzatajn ĉiutagajn vortojn. Ricevebla ĉe: Ŝanhaja Esperanto-Asocio, P. O. Box 1332. Ŝanhajo. Prezo: Dol. 0,20.

„**Gemoj de la hungara popolmuziko**“ — bele eldonitaj kelkaj hungaraj popolaj kantoj, kun notoj. Aperis la unua kajero; eldonanto la Esperanto Grupo de la Hungara Nacia Asocio. Ricevebla ĉe: Dro Julio Lukács, VII. Pillangó-u. 13. Budapest. Prezo: 2.— pengö aŭ egalvaloro.

## TRADUKA KONKURSO.

La plej bona solvo de nia lasta konkurso venis de s-ano Ludwik Krysta, Cieszyn. Jen ĝia teksto, ni nur ne ŝatis la pseŭdorimon „glutegata-frakasata“:

**Bagatelajo.**

Tia estas la afero:  
 Vermon manĝas la pasero,  
 La paseron kato kaptas,  
 Hundo lastan manĝadaptas,  
 Hund' de lupo glutegata  
 De panter' lup' frakasata,  
 La leono tiun batas  
 Kaj leonon mortan ŝatas  
 Homo, — lin la verm' en tero.  
 Tia estas la afero.

La aliaj konkursintoj: Brochwicz, S. Ch. (Lwów), inĝ. Chmieliński, „Nekonatulo“, Niedźwiedz, Orzech.

La plej proksima traduka konkurso aperos en la Januara numero kaj en havos tekston pollingvan frazeologian por plej ĝusta esperantigo.

**Dr. L. Dreher. L. K-ano.**



## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Ŝapiro, Lipowa 33, Białystok.

Konto ĉe PKO No 60.047.

**OFICIALA BULTENO No 13.**

**PREMIOJ POR VARBADO.** Laŭpromese ni publikigas la liston de premioj, konsentataj por varbado de novaj anoj.

Por varbado de nova Membro oni rajtas elekti unu el la premioj: A. Fundamento de Esperanto. B. Dro Zamenhof: Lingvaj Respondoj. C. Robert Kreuz: 500 Komercaj Frazoj. D. Kolekto de turismaj presajoj kaj gvidfolioj. E. Camescasse: Inicado Matematika. F. Verax: Elementa Fotografa Optiko.

Varbinte novan Membro-Abonanton oni rajtas elekti unu el la jenaj premioj: I. Ŝlosilaro de Esperanto (kompleta kolekto, konsistanta el ŝlosiloj en 15 lingvoj). II. Kreuz kaj Mazzolini: Komerca Vortaro (bindita). III. Dreves Uitterdijk: Miraklaj Aventuroj de Sinjoro Longkrurulo (kun 152 desegnaĵoj).

Varbinte novan Subtenanton oni rajtas elekti unu el la jenaj premioj: 1. Raymond Schwartz: Prozo Ridetanta. 2. Tri libroj el listo de premioj por frupaginto laŭ libera elekto. 3. Tuta kolekto de premioj por varbo de simpla Membro.

**PREMIOJ POR FRUPAGO.** Premion de frupago rajtas ricevi la membroj, kies kotizo alvenos al la Teritoria Oficejo ĝis plej malfrue 31. XII. 1929.

„POLA ESPERANTISTO“ POR UEA-NOJ. Ni memorigas, ke Membroj-Abonantoj de UEA rajtas ricevi „Polan Esperantiston“ je favoraj kondiĉoj. Ili pagas por tutjara abono nur 5 zlotojn anstataŭ 8 zl. Tiu favora abonprezo ne estas akceptata direkte de la Administrejo de „Pola Esp.“ Bonvolu pagi tiun abonmonon aŭ kune kun la kotizo aŭ aparte al la loka Delegito resp. al la Ĉefdelegito.

**INSIGNOJ DE UEA.** Insignoj por membroj de UEA estas riceveblaj ĉe la Ĉefdelegito por prezo de zl. 2,50, enkalkulinte la rekomenditan afrankon. La mono devas esti pagita je PKO No 60.047.

**STATO DE UEA EN POLUJO.** La 1-an de Decembro 1929 UEA kalkulis en Polujo 30 membrojn jam por la jaro 1930 (3 DM, 16 MA, 10 M, 1 Esp. Entrepreno).

**NOVAJ DELEGITOJ.** Ni informas pri jenaj novaj Delegitoj:  
**ŚWIECIE** n. W. D. Józef Żołnierek, gimnazia profesoro, ul. Dworcowa 38.  
**TUCZYN** (Wołyń) D. F-ino Leja Kornin, instruistino.

Provizore ne estas plu Delegito en Staszów.

Białystok, la 1. 12. 1929.

J. Ŝapiro, Ĉefdelegito de UEA.

### DE LA REDAKCIO — OD REDAKCJI.

Tiu-ĉi n-ro dediĉita al memoro de nia Majstro aperas iom pli frue ol kutime.

**AL ĈIUJ NIAJ ABONANTOJ, AMIKOJ KAJ SAMIDEANOJ LA REDAKCIO KAJ LA ADMINISTRACIO OKAZE DE LA KRISTNASKAJ FESTOTAGOJ KAJ DE LA NOVA JARO SENDAS PLEJ KORAJN SALUTOJN KAJ BONDEZIROJN.**

Tiu-ĉi numero estas sendota al ĉiuj Redakcioj de la Esperanto-Gazetoj (laŭ jarlibro de UEA) kun varma peto pri daŭra interŝanĝado. Pripensu, ke aŭtentikaj kaj baldaŭaj informoj pri Esperanto-movado en la tuta mondo estas nepre bezonaj por la bono de nia afero.

Okaze de la festo de la libro aĉetu almenaŭ unu esper. libron. Libreja fako de P. E. estas je Via dispono kaj atendas Vian mendon.

Korespondujacy z zagranicą powinni niezwłocznie zamówić sobie „Polaj Kristnaskaj Kantoj“.

Estas menciinde, ke aperis tre grava verko: L. L. Zamenhof Originala Verkaro, kolektita de d-ro J. Dietterle, tre bele eldonita de F. Hirt et Sohn en Leipzig.

**Ne forgesu renovigi la abonon por j. 1930! Pagu la abonon je nia konto PKO 406.660.**

**Abonu mem kaj varbu abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!**

# ROBOTNICZE STOWARZYSZENIE ESPERANTYSTÓW „PRACA — LABORO“ W POLSCE

(Adres Zarządu: ul. Marszałkowska 81, u adw. Litauera)

posiada stale na składzie następujące wydawnictwa dla nauki i propagandy pomocniczego języka międzynarodowego Esperanto:

- 1. Samouczki:** prof. Kronenberga 1,20 zł, Leo Turna niższy 1,25 zł, wyższy 1,50 zł. Carta-Borela z Kluczem i Rozmówkami (3 tomiki) 2,50 zł. Jana Tichawskiego dla kursów 7,50 zł. Grenkampa „Klucz” z bajką Andersena 0,50 zł.
- 2. Słowniki:** Antoniego Grabowskiego po 1,80 zł (esp.-pol. i pol.-esper.). Jana Zawady najnowszy „Pełny podstawowy” nakładu własnego zł. 2,50 dla członków Tow. Esp.
- 3. Propagac.:** prof. A. Czubyńskiego „Esperantyzm” — cena zł. 3.—. Bolesława Czechowskiego „Podróż po świecie dostępna dla każdego” — cena 0,50 zł, Leopolda i Zofji Kronenberg: „Do społeczeństwa polskiego — dwa artykuły w sprawie Esperanta” — 0,60 zł. Pocztówki ilustrowane z grobem Dra L. L. Zamenhofa 0,30 zł, — z dziewczynką i napisem: „Mamusiu, przez Esperanto chcę kochać dzieci całego świata” — 0,20 zł.

Zamówienia skierowywać należy na adres sekretarza: Jan Zawada, Miasto-Ogród Czerniaków, ul. Zaciszna 1. Warszawa, Konto PKO. 20845, dodając 10 procent na koszt przesyłki.

Stowarzyszenie prowadzi też KURS KORESPONDENCYJNY — za opłatą 12 zł, płatnych ewent. w dwóch ratach z góry. Uczący się drogą korespondencyjną otrzymuje wskazówki do samouctwa, poprawianie wszystkich przez siebie przerobionych ćwiczeń z podręcznika i wszelkie z tem związane uwagi — aż do zupełnego opanowania języka.

---

## Libreja Fako de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Smoleńska 9. Konto PKO. 406.660.

### REKOMENDAS:

Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.80
Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20
Glumarkoj „Babel” 10 pecoj	0.10
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30.	
Kraków — Urbo de Jubileo Kongreso 1912	0.80
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo”, podr. Esp.	7.50
Zawada — Pełny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.)	4.00

### La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parte po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baharah. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Bałucki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bonnels — Solandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.30
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krioj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy — Morgaŭ matene	2.60
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Lippmann — Sprachliche Gutachten	2.00
Malgranda terbiblio	2.00
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	2.60
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.35
Privat — Vivo de Zamenhof	5.40
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Schmidt — La amkonkurantoj	0.85
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Ariŝ, trad. Ant. Grabowski	1.40
Sapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Slosilo esper. en pola lingvo	0.60
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	1.50
Vigny — La intervidigo kaj nekonita dialogo	0.90
Wiesefeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Wysłouch — El lando de ruinoj	0.45
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10

Nur antaŭpago. — Por sendkosto aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.